



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

Malsano kaj resanigo

Martinus:

La gardaĝeloj de la
lumo kaj la mallumo

Ole Therkelsen:

La infana hejmo de
Martinus en Sindal

Mihai Trifoi:

Logiko kaj La ideala
nutraĵo en la rumana
lingvo

Martinus:

La vibradoj de la
ideala nutraĵo

Bjørn K. Øyen:

La Kosmologio de
Martinus kaj nutraĵo

Rita Valčiukaitė:

Libroj de Martinus
en la litova lingvo

Erik Gerner

Larsson:

Martinus 4
La malluma kaj la
luma mondsavo



Danio

La unua artikolo de Martinus pri-traktas la interesan temon pri “Malsano kaj resanigo”. Tiu temo ankaŭ estas la ĉefa temo por venonta kvina volumo de La Eterna Mondbildo (LEM5). Martinus intencis skribi kvinan kaj sesan simbollibron, sed li ne skribe klarigis la simbolojn antaŭ sia forpaso en 1981. Tamen en diversaj surbendigitaj prelegoj li klarigis ĉiujn ĉi menciitajn simbolojn. Mi mem en la Instituto partoprenas en la prilaboro de la simbolklarigoj por LEM5. Laŭplane tiu kvina simbollibro eldoniĝos en dana lingvo antaŭ novjaro.

La terglobo

En decembro 2009 en Bella Center (kie ankaŭ en 2011 okazos la 96-a UK) en Kopenhago okazis la pinta kunveno pri la klimato de la terglobo kun inter aliaj 132 ŝtatestroj. Laŭ tiu vidpunkto la tri sinsekvaj artikoloj de Martinus pri la vivo de la terglobo: 1. “Gardanĝeloj en la servo de la nacio” (Kosmos n-ro 2-2009), 2. “Gardanĝeloj de la lumo kaj la mallumo” en ĉi tiu numero, kaj sekva 3. “La regno de la difilo” (Kosmos n-ro 2-2010), estas interesaj kaj tre aktualaj. La tri artikoloj ankaŭ estas tre rimarkindaj, ĉar Martinus ĉi tie pritraktas flankojn de la tergloba vivo, kiun li ne pritraktas en iu alia loko de sia tuta verko.

Rumanio

Jam antaŭ kelkaj jaroj s-ro Mihai Trifoi tradukis la kvar simbollibrojn (La Eterna Mondbildo 1-4) el Esperanto en la rumanan lingvon. Poste li ankaŭ tradukis la libron “La ideala nutraĵo”, kaj laste la grandan libron “Logiko”.

La libroj, kiuj estas presitaj en Martinus-Instituto en malgranda eldonkvanto, estas aĉeteblaj en la nova reta librovendejo de la Instituto ĉe la adreso: shop.martinus.dk.

Litovio

S-ino Rita Valčiukaitė, kiu plurfoje dum la lastaj dek jaroj studis en Martinus Centro, Klint, tradukis la saman libron, “La ideala nutraĵo”, ankaŭ el Esperanto sed en la litovan lingvon. Krome ŝi ankaŭ tradukis la libron “La mistero de la preĝo”, kiuj nun ankaŭ estas presitaj en Martinus-Instituto en malgranda eldonkvanto. Vidu shop.martinus.dk.

Albanio

La albana esperantisto s-ro Agim Peraj, kiu dum 12 jaroj abonis nian revuon Kosmos tradukis la libron “La ideala nutraĵo” el Esperanto en la albanan lingvon. La libro pretas por presado en la Instituto.

Tio montras, ke Esperanto estas tre valora por Martinus-Instituto kiel pontlingvo al ekzotaj lingvoj.

Sindal, Danio

Ekde la solena inaŭguro la 11-an de aŭgusto 1990 okaze de la 100-jariĝo de Martinus la infana hejmo de Martinus en Sindal en fora norda parto de Danio funkcias kiel muzeo. Nova inspektora paro estas Xuan kaj Flemming Nielsen. Ĉiu estas bonvena viziti la Martinusdomon, Ulstedbovej 15, DK-9970 Sindal, laŭ interkonsento ĉe la adreso: martinussindal.dk.

Ole Therkelsen



Malsano kaj resanigo

de Martinus

De manuskripto al prelego en Martinus Instituto dimanĉe la 23.11.1952. La para-grafa superteksto en dana lingvo estas farita de Ole Therkelsen kaj aprobita de la konsilio la 10.12.1996. Unuan fojon en dana Kosmos n-ro 5-1997.

1. Malsano pro la malobeo de la vivleĝo

Unu de la plej konataj fenomenoj en la mondo estas “malsano”. Kaj tamen tiu nur estas konata dum tiu stadio de evoluo, kie ĝi kreas fortan doloron aŭ ĝenon en la fizika organismo. Sed malsano povas havi stadiojn, dum kiuj tio tute ne estas sensata aŭ perceptata de la individuo kiel malsano. Tiuj stadioj estas tre danĝeraj por tiu estulo, ĉar la estulo ne speciale sentas emon batali kontraŭ la malsano, kiu tiel trankvile povas evolui, flori kaj porti maturajn fruktojn, kio signifas evolui sin al la stadio, kie ĝi estas travivata kiel doloro kaj sufero por fine subfosi la fizikan organismon, kio povas signifi nenaturan fizikan morton. Ke ekzistas malsano montras al ni, ke la normala vivtravivado, kio signifas plene centprocentan agrablon, nur povas okazi per la plenumo de speciala leĝo. Kiu ajn malobeo, eĉ la plej malgranda, absolute samgra-

de iel volas malfortigi la vivtravivadon. Ĉar la plej multaj homoj mortas pro malsano – ne pro maljuneco – fariĝas fakto, ke la vivleĝo samgrade estas malobeata.

2. La hospitaloj daŭre estu pligrandigitaj

Oni foruzas enormajn fortojn por kontraŭbatali la malsanojn. Dank’al la scienco oni konstruis multajn grandegajn malsanulejojn, kiuj preskaŭ estas kiel urbetoj en la urboj. Miloj da kuracistoj kaj flegistinoj finlernitaj en la tuta mondo faras kolosan kaj mirindan laboron por resanigi tiun plej grandan malbonon de la homaro. Tamen oni daŭre devas konstrui la hospitalojn pli grandaj, kaj tamen ofte estas tre longa atenda tempo por la malsanuloj, se ili ne estas tre malsanaj aŭ en vivdanĝero. Kial do la malsanoj ne malaperas? – Kial ne estas malpli kaj malpli necese konstrui hospitalojn? –

Kial ne fariĝas pli kaj pli ordinare, ke la homoj radias brilantan sanecon kaj agrablon? Se oni volas havi perfektan respondon al ĉi tio, oni devas lerni kompreni, kio malsano reale estas.

3. La du stadioj de malsano

La malsano ekzistas en pli granda regiono ol tiu, en kiu ekzistas la doloroj kaj la ĝeno ligita al la malsano. Sed ĉar ĝuste en tiu pli granda regiono ne estas doloroj, oni ne sentas la malsanon ĉi tie, kaj kvankam ĝi estas trovita, oni ne kontraŭbatalas ĝin ĝuste pro tio, ke ĝi estas sen doloroj. Oni trankvile daŭrigas malobei la vivleĝon kaj per tio la malsano evoluas al stadioj kun doloroj kaj ĝenoj aŭ tiu stadio, kie oni nur nun ekkonas tiun kiel "malsano". Sed dum tiu stadio la malsano jam venkis la ordinaran propran kontraŭforton de la organo, kaj tial la estulo devas uzi artajn ilojn kaj fortojn por kontraŭbatali la malsanon. Sed tiuj iloj ofte estas nenaturaj kaj en si mem povas okazi malsanon en aliaj regionoj. Kaj tre ofte tio estas tro malfrue. La malsano jam ekhavis tiajn radikojn, ke oni ne povas kontraŭbatali la malsanon, kaj la estulo mortas. Sed tamen oni ofte nur estas sur tiu stadio, kie oni kontraŭbatalas la malsanon, kaj same ofte nur ĉi tie la kuracistoj serĉas la kaŭzon al la malsano. Sed la vera kaŭzo de la malsano ne troviĝas ĝuste tie. Tiu estas trovebla en la antaŭa stadio de la malsano, nome la sendolora stadio. Malsano havas du unuarangajn stadiojn. La unuan ni povas nomi "la stadio de la kaŭzo". De tiu stadio ĝi evoluas al "la efika stadio", kio do signifas la stadio de doloroj kaj ĝenoj. La kaŭzo ne troviĝas sur la fizika sfero, tiu ekzistas nur en la psika aŭ la mensa regiono de la individuo. Ĉi tie ĉiuj malsanoj havas sian originan

aŭ plej unuan fonton, kaj same ĉiuj formoj de absoluta bonfarto ankaŭ ĉi tie havas sian plej internan fonton.

4. Avidogvidata volo kaj volgvidata avido

La tuta organismo, ĝiaj multaj organoj, ĉeloj kaj molekuloj, estas kunligita de io psika. Tiu psika estas la konscia kaj subkonscia regiono de la individuo kaj estas ĝia menso. En tiu menso ekzistas la travivanta kaj kreanta mio. Tiu ĉi mio havas volon. Sed la estulo povas esti en situacio, kie tiu volo preskaŭ sole estas gvidata de nekontrolita avido. Do la estulo ekhavas ĉian suferon. Sed tio gvidas la estulon al pli kaj pli intelekto kaj per tio la volo komencas kontroli la avidojn, kaj la estulo kreskas al pli kaj pli perfekteco kaj fariĝos "la homo laŭ la bildo de Dio". Kaj jen ni estas ĉe la regiono en la mensa interno de la estulo, en kiu la tuta sorto de ĝi estas decidata. De tiuj du specoj da volo la ĉiutaga vivo de la estulo estas decidita kaj per tio ĝia rilato al la kunhomoj kaj la materio.

Per la avidgvidata volo la bestaj instinktoj aŭ la besta memkonservado fortigita per sento regas la pensmanieron kaj agon de la estulo. Tiu altgrade estas egoisma kaj estas la plej proksima al si mem. En sia rilato al la materio ĝi same kriante kontraŭlaboras la vivleĝon. Ĝi plenigas sian korpon per danĝeraj produktoj, kiuj tute ne estas nutraĵo, sed pure kaj per la tempo mortiga veneno. Per aliaj vortoj, per la avidgvidata volo la estulo blinde agas kaj alkiutimiĝas al artefaritaj kaj nenaturaj avidoj, kiuj gvidas ĝin al novaj malobeoj. Ĝi ne komprenas, ke la kontentigo de tiuj nenaturaj avidoj estas damaĝa kaj mortiga, antaŭ ol ĝi tra kelkaj vivoj suferis pro la efikoj de

tiuj avidoj kaj la de tiuj evoluintaj malsanoj.

5. Malsano estas manko de amo

La egoisma pensomondo iom post iom fariĝas la pura veneno por la homo, ĉar la vivleĝo por tiu estas la kontrasto de tiu por la bestoj, nome tiu: Ĉiu estas la plej proksima al sia proksimulo, kio ja estas same kiel, ke oni devas ami sian proksimulon kiel sin mem. Samgrade kiel oni ne plenumas tiujn kondiĉojn, kiuj donas sanon kaj agrablon por sia proksimulo, samgrade oni mem venas en ĉirkaŭaĵon, kie oni ankaŭ mem ne estas amata de la proksimulo. kiel li amas sin mem. Kiel alie devus esti? – Inter amemaj kaj sindonemaj homoj oni ja estus kiel hundo en kegloludo. Sed tien oni ne povas veni. Tiuj estuloj ja ĝuste estas protektitaj per iliaj amaj aŭroj. Oni ĉefe tiel mem estu inter estuloj, kiuj kiel oni mem estas egoismaj kaj brutalaj, kaj pro tio oni sopiras pri paco kaj agrablo. La tutan tempon oni estas en milito. La tutan tempon oni devas kontraŭbatali tiun antipation kaj koleron, kiun oni ankaŭ kaŭzas, ke la ĉirkaŭuloj sentas por oni mem. Sed ankaŭ tio estas malsano, kiu kondukas al senamika vivo, kio donas vivenuon, kaj kondukas al la mensa mallumo kaj kelkfoje al memmortigo. Do la estulo povas morti pro manko de amo al sia proksimulo. Esti malama al sia proksimulo do estas serioza kaŭzo al malsano.

6. La pensoj vibras en sango kaj organismo kiel vivforto

Kolero kaj malamo ja estas la avido por venĝo. Lasi tian avidon gvidi sian volon estas la plej danĝera, kion oni povas fari. Tio estas same kiel krei mensan mortmalsanon en si mem. Sed homoj, kiuj estas plenaj je tia mortiga

avido, ĉagreno kaj amareco ricevas malbonan vivforton, ĉar tiuj pensoj vibras en iliaj sango kaj organismo kiel vivforto. Malbona vivforto kaŭzas malbonan sangon, kaj malbona sango donas malbonan nutraĵon por la mikrovivo aŭ mikroindividoj de la organismo. La mikrovivo estas niaj ĉeloj, molekuloj, organoj kaj glandoj k.t.p. Akiri malsanajn organojn aŭ organojn, kiuj ne funkcias ĝuste, tio signifas, ke la organa funkcio ne estas sufiĉa. La organismo estas malfortigita, malsana kaj mizera. Kaj interne de tia organismo estas ĉiuj ebloj por, ke la mikrovivo povu eniri en erarajn kunligojn, kiu povas fuŝkontakti ilian kunlaboron. Ili ne povas plenumi sian mision en la organismo, kaj samgrade estiĝas nenormalaj regionoj, kiuj povas esti tiel gravaj, ke estiĝas tumoroj, troaj kalkiĝo aŭ ŝtoniĝo. Terura doloro kaj suferoj estiĝas. Kaj nur sur tiu stadio la doloro kaj sufero estas kontraŭbatataj. Ke tio tre ofte estas tro malfrue, vi facile povas kompreni per ĉi tiu klarigo.

Eble oni volas diri, ke malsanoj kiel rompita kruro aŭ invalideco per eksteraj fortoj, per laboro kun maŝinoj aŭ simile, tio ja ne povas havi sian radikon en la interna mensa regiono de la individuo. Sed la respondo estas absolute jes, ke eĉ tiaj specoj da sorto havas sian plej internan radikon en la avidgvidata volo. Kial ĝi rompas sian kruron? – Kial la estulo devas travivi vundon per la laboro de maŝino? Kial la aliaj malagrabloj de ekstere? – Ĉu oni ne kredas, ke la rilatoj kaj la ĉirkaŭaĵo, en kiu ni vivas nian ĉiutagan vivon, respondas al la rilatoj kaj vivkondiĉoj, kiujn ni donas al niaj propraj mikroestuloj en nia propra organismo? – Nia tuta sorto estas kaj fariĝas rezulto de tiuj rilatoj, kiujn ni donas al nia ĉirkaŭaĵo por la vivo en

nia organismo, kaj la rilatoj, kiujn ni kreas por nia ĉirkaŭaĵo kaj nia proksimulo en la ekstera mondo.

7. La batalo kontraŭ la malsaniga avido

Ĉiu malfeliĉa sorto estas malsano kaj estas kaŭzita de nia propra, ĉioreganta kaj malfeliĉiganta avido, kiu gvidis nian volon por kontentigi tiujn avidojn. Tiu plenumo fine aktivigis tiun disharmonion kun la vivo, kion ni nomas malsano aŭ malfeliĉa sorto. Tial oni devas kontraŭbatali tiajn avidojn hodiaŭ, kvankam ni ankoraŭ ne sentas suferon aŭ senteblan ĝenon de ili. Kontraŭe oni povas atendi malsanon poste dum la vivo kaj same dum venonta vivo. La

vivo havas tempon por lasi la objektojn kreski. La estulo certe volos lerni, kio estas sana kaj normala konduto, kaj kio estas nenatura kaj mortiga por li mem kaj liaj kunestuloj.

La ne finskribita manuskripto de Martinus finiĝas per la vortoj: "Priparolu ĉi tie la avidojn, kiuj kondukas la volon de homoj al malfeliĉo en la tuta mondo. Tabako, alkoholo kaj manĝado de viando, ĉasado, fiŝkaptado kaj la militsinteno, k.t.p."

Originala dana titolo: "Sygdom og helbredelse" (Kosmos 5-1997). Traduko Ejnar Langkilde, prilaborita de Ole Therkelsen en 2010.



Martinus en 1953 antaŭ Vilao Rosenberg en Klint, kie li loĝis dum la someroj 1937-1981

La gardaĝeloj de la lumo kaj la mallumo

de Martinus



La artikolo estas daŭrigo de "Gardaĝeloj en la servo de la nacio" (n-ro 2-2009), kaj ĝi daŭrigos per tria artikolo "La regno de la difilo" en sekva n-ro 2-2010.

1. Direktantaj gardaĝeloj malantaŭ ĉiuj funkcioj

La spirito de la terglobo estas la primara gardaĝelo de la homaro, kaj ĉiuj inter si kontraŭaj fortoj, kio signifas la diversajn spiritajn direktojn, ĉu politikaj, ĉu religiaj, deiras de la talentokernoj de la terglobo. Per talentokernoj ni ĉi tie celas la regantajn fortocentrojn animitajn per la mioj de la vivaj estuloj, kiuj enkarniĝis en la spiritajn kaj fizikajn materiojn de la terglobo. Nur per tiaj fortocentroj direktitaj de vivantaj mioj, organismo povas daŭrigi sian ekziston. Ekzemple, ĉefa mio estas enkarniĝinta en la pulmoj, en la koro, en la cerbo, en la renoj, en la hepato kaj en la galo kaj malantaŭ ĉiuj glandaj funkcioj. Tiuj mioj siavice estas gardaĝeloj por miriadoj da mikroestuloj: ĉeloj, molekuloj, atomoj kaj elektrotoj, kiuj ĉiuj laŭ sia speco estas regataj de ĉefmioj. Sekve la ĉeloj havas siajn respektivajn ĉefmiojn, kaj la atomoj kaj molekuloj siajn kaj tiel plu. La tuta organismo tiel estas organizita mondo, universo en miniaturo. Ĉiu fizika organo en organismo tiel estas loĝata mondo, en kio do vivas socio de estuloj subordigitaj kaj gvidataj de gardaĝelo aŭ reĝo. Se ni rigardas la ordinarajn fizikajn organojn en la fizika organismo: la koro, la cerbo, la pulmoj ktp., ili ĉiuj estas perfektaj mondoj. Ili jam

antaŭ longe trovis la plej perfektan formon por sia fizika organizado. En la koro ne ekzistas dubo, ĉu ĝia manifestado de la sanga cirkulado devas esti tia aŭ alia. Nur unu maniero ekzistas, nome la plej perfekta. Ĉiu alia formo estus abnorma, neperfekta kaj sekve malsaniga manifestaĵo, kiu kreus malharmonion en la organisma bonfarto. La samo validas rilate al la pulmoj, la glandaj funkcioj ks. Ĉiuj fizikaj organoj en la fizikaj organismoj estas perfektaj kaj laboras tiel perfekte helpe de siaj gardaĝeloj, kaj la sub ili organizita socia ordo, ke la makro-mio, la posedanto de la organismo, ne bezonas dediĉi pensforton por tiuj funkcioj, eĉ tute ne rimarkas, ke ĝi havas tiujn multajn diversajn organojn aŭ malgrandajn ŝtatojn aŭ naciojn kun siaj mikroskopaj loĝantoj.

2. La leĝo por la humana komuneco

Kiam la organoj tiel bone funkcias, la kaŭzo estas, ke inter tiuj regnoj jam antaŭ longe estiĝis la plena, komplete humana komuneco, komuneco kiu estas senrezerva frateco. La leĝo, ke ĉiu servu ĉiun, jam antaŭ longe fariĝis klarmensa tagkonscio, praktika evidentaĵo. Ili ja scias, ke se ili ne plenumas tiun leĝon, ilia regno venus en konflikto kun ĉirkaŭaj regnoj, kio

signifas la ceteraj organoj en la organismo, kio rezultus en malharmonio, malsano kaj pereco por la organismo. Ĉi tie la unuopa organo estas centelcente kunaganta por la plua ekzisto de la ŝtato aŭ la regno (la organo), same kiel la ŝtato reciproke garantias la bonstaton de la individuoj. Tia politiko ankoraŭ ne fariĝis universale disvastigita inter la individuoj de la nacioj aŭ etnoj sur la terglobo.

3. La perfektaj konscifunkcioj de la tero

Se ni rigardas fizikan organismon kiel la terglobon, ni do povas vidi, ke ĝi havas certajn regionojn, kie ankoraŭ estas milito kaj neperfekteco en ĝia interno kaj ekstero, same kiel ankaŭ estas regionoj, kie regas la plej bela perfekta ordo, harmonio kaj bonfarto. Tia organa funkcio kiel ĝia rotacio ĉirkaŭ sia propra akso okazas laŭ antaŭdestinita leĝo kun absoluta centelcenta precizeco, sen ke la terglobo devas pensi pri tiu flanko de sia naturo. El la perspektivo de la terglobo, la rotacio okazas tute aŭtomate, sed ĝi estas delegita al por tiu funkcio incita gardanĝelo kaj ties mikroorganismoj. La samo validas rilate al la spiro kaj sangofluo de la terglobo, kio signifas la cikladon de la akvo, de vaporigo al aero kaj la densigo al pluvo denove, kaj la per tiu proceso subtenitaj vivkondiĉoj por animalaj estuloj. Ĝia digesto, el la perspektivo de la tergloba mio, ankaŭ okazas aŭtomate. Ĝia digesto kaj akcepto de fizika nutraĵo konsistas el ĝia asimilado en sian korpon de grandega kvanto de suna materio, alivorte, la kvanto de lumo kaj varmo, kiun ĝi ĉiun tagon ricevas de la suno. Tiu materio en kunligo kun ĝia sangocirkulado, per la aera kaj akva funkcioj, ja transformiĝas al animala kaj vegetala

vivo. Tio estas la vera fizika nutraĵo de la terglobo. Kiel ni vidas, ĉi tie okazas la samaj vivfunkcioj kiel en ĉiu alia viva estulo. Eĉ dormon ĝi ricevas. Ĉie, kie estas mallumo, ĝiaj mikroestuloj ricevas kondiĉojn por ripozi. La homoj, la bestoj kaj la plantoj, kiuj ja estas la mikroestuloj kaj talentokernoj de la terglobo, ja dormas dum la nokto aŭ en loko kie la lumo de la suno provizore ne estas. Rigardante ĉiujn ĝiajn fizikajn funkciojn kaj kreoprocetojn ni povas vidi, ke ili jam estas aŭtomataj, estas organizitaj tiel perfekte, ke la tergloba mio eĉ ne bezonas pensi pri tiuj funkcioj. Tiu parto de ĝia apero jam antaŭ longe estis plene perfektigita.

4. La krizo de la tero: diktaturo aŭ demokratio

Tamen ekzistas aliaj regionoj, kie la tero ankoraŭ ne finkreis la talentokernojn, kaj kie la funkcioj ankoraŭ ne atingis la plej altan gradon de “iniciĝo”, kio signifas la kompletan memstarecon, la kompletan suverenan liberecon, la totalan kapablon kaj scion por povi labori memstare favore al la tergloba mio sen ties kunagado. Ekzemplo de tia nepreta regiono en la organizo de la tergloba mio estas la regiono, en kiu la mikroestuloj konsistas el la terhomoj. Ĉi tie estas granda aktivado de kontraŭaj fortoj por kaj kontraŭ la humaneco aŭ la amo al la proksimulo. La perfekta kunlaboro, la perfekta komuneco inter la terhomoj do ankoraŭ ne estas atingita, nek inter la terhomaj individuoj reciproke nek inter la direktantaj gardanĝeloj de iliaj nacioj. Ĉar ne estas unueco inter la gardanĝeloj de la nacioj, etnoj aŭ popoloj, ankaŭ ne povas esti unueco inter la fizikaj estroj de la ŝtatoj, ĉar ili ja nur estas provizoraj reprezentantoj aŭ medioj de tiuj gardanĝeloj. La funk-

cioj de gardanĝeloj ja ne estas el fizika, sed el penseca naturo. La kontraŭaj ideologioj, kiuj nun manifestas sin, ja devenas de la terglobo mio. Ĝi estas en iaspeca krizo, en kiu ĝi devas difini sian sintenon favore al la unua aŭ dua el la du ideologioj, diktaturo respektive demokratio, ŝtata subpremo respektive ŝtata liberigo de la individuo aŭ ŝtata persekuto respektive ŝtata protekto de la plej alta mensa evoluo de la individuo. En tiu parto de la spirita regiono de la terglobo oni ne povas nei, ke la situacio momente estas iom ŝanceliĝema. La diversaj potenculoj estas animitaj aŭ okupitaj de la malantaŭe situantaj gardanĝeloj. Tial iliaj paroloj, prelegoj kaj aperoj povas okazi kun grandega forto kaj potenco. Tio validas same por la diktatoroj aŭ la potencmalsanaj batalantoj, kiel tio validas por la mondliberigantoj. La sola diferenco inter la mondliberigantoj kaj la potencmalsanaj, egoismaj diktatoroj aŭ rabistoj de libereco, estas ke la du specoj de individuoj havas diversajn iniciĝojn. La diktatoro estas incita talentokerno de en la terglobo malnoviĝinta sistemo, kiu ne plu havas kondiĉojn por vivi, ĉar ĝi ne plu havas la plenan subtenon de la terglobo, ja, eĉ estas iugrade kontraŭbatata de tiu terglobo mio. Aliflanke, la mondliberiganto estas incita talentokerno de sistemo, por kiu la terglobo nun estas matura kaj preta meti ĝin sur la tronon en sia konscio. Tial la ideologio de la mondliberiganto aŭ la sankta spirito ricevos ĉiujn eblajn kondiĉojn por venki, ĝi ja parte jam venkis. Nun nur restas por la terglobo mio forigi la ne plu utiligeblajn talentokernojn, kiuj pro tio estas mortantaj. Sed mortantaj talentokerno, kio ja estas la samo kiel mortantaj estuloj, ĉiam aktivigas ioman bataladon kontraŭ la morto.

Batalado, kiu kelkfoje povas montri grandan fortodisvolvadon, fortodisvolvado kiun ni konas sub la nocio mortkonvulsioj. La du ideologioj en la mondo estas do unu kreskanta kaj unu velkanta, unu kiu estas naskiĝanta kaj unu kiu estas mortanta. La unua donas naskiĝodolorojn dum la alia donas mortkonvulsiojn. Ne estas strange, ke saĝuloj aŭ kosme konsciaj estuloj de la pratempo per tiom granda kompetenteco kaj precizeco povis antaŭdiri la nunan mondregantan dipereon kaj la militon de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, aŭ tion, kion ni ankaŭ esprimas kiel “infero”.

5. La lumo kaj la mallumo havas la saman originon

Estas tiu ĉi spirita stadio de la tero, kiu en la homoj kreis la konceptojn “malbonaj spiritoj” kaj “bonaj spiritoj”, kaj sekve ankaŭ la konceptojn “diablo” kaj “Dio”. Kiel ni ĉi tie vidis, tiuj du nomoj absolute ne sufiĉas por la reala vero. Unue, la mallumo en la spiritaj fortoj de la homaro havas la saman originon kiel la lumo. Tio nur estas rivelado de ĝenerala principo. Mortanta interesosfero anstataŭigita de nova kaj pli perfekta interesosfero. Ja estas la samo kio okazas en nia ĉiutaga vivo. Kiam ni kelkfoje spektis interesan filmon aŭ teatraĵon, tiu ne plu estas interesa. La samo ja validas rilate al bona ŝerco, kiel ajn bona, sed ĉiun fojon ni aŭdas ĝin, ĝi iĝas pli kaj pli neinteresa. Ni deziras spekti novajn filmojn kaj novajn teatraĵojn, ni deziras novajn travivaĵojn kaj deziras liberiĝi de la malnovaj. Sed tio ne signifas, ke la malnovaj estas diablaj aŭ malbonaj en absoluta senco. Ili ja daŭre estas interesaj por tiuj estuloj, por kiuj ili estas novaj. La situacio de la homaro do estas tiu, ke la terglobo nun estas travivanta novan, interesan konscire-

gionon aŭ spiritsferon kaj finanta malnovan finspertitan sferon, kiu iam estis tiel interesa, ke ĝi plenigis ĝian tutan konscion. Ke la estuloj, kiuj estas iniciataj por esti talentokerno por tiu spirita direkto aŭ ideologio, ne povas trovi bonajn vivkondiĉojn sur la tero, tio estas komprenebla afero kaj ne io malbona. Tiuj ĉi estuloj devos naskiĝi sur alia planedo, se ili ne povas finsperti sian spiritan direkton sur ĉi tiu planedo. La origino, aŭ la primara talentokerno por tio absolute ne estas diablo aŭ malbona estulo, same kiel oni ne povas diri, ke leono aŭ tigro estas malbona estulo, ĉar ĝi mortigas aliajn bestojn. Ja provizore estas vivkondiĉo por ĉi tiuj bestoj, ke ili mortigu por vivi. Kaj tiu sama provizora vivkondiĉo ankaŭ validas por la talentokerno aŭ la gardanĝelo de la diktaturo, same kiel fariĝis vivkondiĉo por mallumaj mondliberigantoj. La diablo sekve ne estas iu nigra aŭ malhela Dio, same kiel la mondliberiganto ankaŭ absolute ne povas esti Dio. La reala vero pri la diablo estas, ke li estas gardanĝelo de la diktaturo aŭ la aŭtokratio, kaj la vero pri la mondliberiganto estas, ke li ne estas Dio, sed gardanĝelo aŭ talentokerno de la komuna potenco aŭ la demokratio. Ambaŭ estas talentokerno en la psiko de la terglobo mio.

6. La gardanĝelo de la lumo kaj mallumo en la psiko de la terglobo

Se ni nun rigardas nin mem kiel terhomojn el la sama perspektivo, evidentiĝas, ke ni ĝuste ricevis provizoran hejmlokon sur la terglobo kaj fariĝis mikroindividoj en ĝia organismo kaj konscio. Ni ja havas psikon, kiu estas plene kongrua kun tiu de la terglobo. Interne de la psiko de la neinicita terhomino tiuj du ideologioj ankaŭ ekzistas. Ni batalas kun niaj de la pratempo hereditaj talentokerno

aŭ potencocentroj por la mallumo kaj la aŭtokratio, kaj ni ankaŭ batalas por la proprigo aŭ kreado de novaj potencocentroj, kiuj estos loĝataj de talentokerno por komuna potenco kaj komuna regado. Sed antaŭ ol ni plene povos transiri al la ideologio de la komuna potenco aŭ al la devizo de amo al la proksimulo, kie ĉiuj devas vivi por ĉiuj, ni devas esti finmanifestintaj ĉiujn niajn talentojn por nia ligiteco al la aŭtokratio aŭ diktaturo. Tiel longe kiel filmo aŭ teatraĵo estas interesa, oni volonte ĝin spektas kaj spertas. Pli frue la altiro al tia travivaĵo ja ne estas satigita aŭ kontentigita. Sed la tempo ne estas tiom malproksima, kiam la homoj plene satiĝos je la diktaturo kaj komprenos, ke nur la demokratio povos doni tiun veran kontentiĝon, je kiu ĉiuj homoj esperas kaj serĉas. Estas tiu kontentiĝo, tiu satiĝo, kiu estas esprimata kiel “la daŭra paco”. Daŭra paco signifas daŭran harmonion inter la estuloj, kio signifas la totalan regadon de la regiono fare de la nova talentokerno kaj la forigon de la malnova talentokerno el la organismo de la terglobo. Tio estas la plenumo de la biblia antaŭdiro ke la diablo estos ligita aŭ senpotencigita. Ni vidas, kiel la du talentokerno de la terhomino psiko troviĝas en batalo pri la regado sur la kruco de Golgota aŭ ĉirkaŭ la sufera rakonto de Jesuo. La ekzekutistoj de Jesuo, la plej superaj pastroj, la skribistoj kaj fariseoj estis mikroindividoj en la primara talentokerno de la aŭtokratio, dum Jesuo, liaj disĉiploj kaj adeptoj estis mikroindividoj en la primara talentokerno de la komuna potenco. Per la du talentokerno, ĉio riveliĝas antaŭ ni – antaŭ ni staras la gardanĝeloj de la lumo kaj la mallumo en la psiko de la terglobo. Sed per la krucumado ni vidis, ke la mikroindividoj de la luma gardanĝelo

estis tiel fortaj, ke eĉ la morto ne povas disvastigi timon dum ilia ĉeesto. La komuna potenco aŭ la amo al la proksimulo estas la plej alta vivfaktoro por la incitaj mikroindividuoj aŭ mikrotalentokerno en tiu gardanĝelo. Kontraŭe, la mikroindividuoj de la alia talentokerno timas morti. Ili kredas sin kapablaj forigi la timon pri la morto kaj malfeliĉaj sortoj per armiloj. Ili estas milfoje pli forte armitaj ol la plej sovaĝaj rabobestoj. Sed ni vidas, ke la novaj mikrotalentokerno en la lumregiono de la tergloba konscio jam venkis la morton, la mallumon kaj la malamon. Per la vortoj: “Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras” ili ne nur pardonas, sed ankaŭ montras

ke ili komprenas la mikroindividuojn de la malluma gardanĝelo kaj per tio konfirmas la venkon de la lumo super la mallumo.

Originala dana titolo: “Skytsengle i nationens tjeneste”. La artikolo estas laŭ manuskripto, kiun Martinus skribis kiel preparo al prelego en Martinus-Instituto la 10.04.1949. Danligva prilaboro kaj paragrafaj superskriboj estas farita de Ole Therkelsen kaj aprobita de la konsilio la 22.04.1997. La unuan fojon en dana Kosmos n-ro 2-1998.

Traduko Ejnar Langkilde. Prilaborita de Henning Sato von Rosen, Hokan Lundberg kaj Jonas Dalmoose en 2010.



Martinus Instituto en 2005. En 1943 dum la dua mondmilito Martinus relative malmultekoste aĉetis grandan domon kun prelegejo per pruntita mono. Dum la lastaj 38 jaroj de sia vivo inter 1943-1981 Martinus loĝis la unua etaĝo en tiu bela domo ĉe la adreso Mariendalsvej 94-96, Frederiksberg, Kopenhago.

La infana hejmo de Martinus en Sindal

de Ole Therkelsen



Martinus naskiĝis en la bieneto *Moskildvad* proksime de la vilaĝo Sindal la 11-an de aŭgusto 1890. Lia patrino, Else Christine Mikkelsen, estis dommastrino ĉe grandbienisto Lars Larsen en la granda bieno *Kristiansminde*, kiu situas 7-8 kilometrojn de *Moskildvad*.



La infana hejmo de Martinus en Sindal

Senedzinite ŝi vivis en *Kristiansminde*, kiam ŝi komence de 1890 konsciis pri la fakto, ke ŝi fariĝis graveda. Ŝia duonfrato *Jens Christian Frederiksen* kaj lia edzino *Kristine* posedis la bieneton *Moskildvad*, kaj ŝi aranĝis, ke ili prizorgu kaj adoptu la infanon tuj post la naskiĝo, ĉar ne eblis havi la infanon ĉe si en la bieno.

Spite la fakto ke ili estis tre malriĉaj kaj jam havis 11 infanojn, ili akceptis prizorgi ankoraŭ unu infanon. Tamen la plimulto de la infanoj jam "forflugis de la nesto". Tiam infanoj en la kamparo jam ekde la 14-a jaro komencis labori kaj loĝi ekster la hejmo, kaj en la domo

nur restis du knaboj, unu tri jara kaj alia kvin jara.

Ĝus antaŭ noktomezo lunde la 11-an de aŭgusto Martinus naskiĝis en la bieneto *Moskildvad*, al kiu la patrino alvenis kelkajn tagojn antaŭ la naskiĝo.

Nun la malgranda Martinus kreskis ĉe zorgantaj gepatroj en tre modesta hejmo, kie li estis edukita kune kun la du iom pli aĝaj edukfratoj.

La edukpatro estis voja laboristo, li riparis la vojojn proksime al la hejmo, kaj dumvintre li kune kun arbisto faligis arbojn en *Slotved Arbaro*. Al la bieneto apartenis 3 hektarojn, kie lia sola bovino kaj kelkaj ŝafoj paŝtigis. Li ankaŭ havis paron da porkoj kaj kelkajn kokinojn.

Malgranda terpeco estis uzata kiel ĝardeno kun legomoj kaj floroj, kaj en eta angulo la edukgepatroj donis al Martinus lian propran ĝardenon kun tablo kaj benko.

Tre plaĉis al Martinus sidi sur la pinto de monteto proksime de la domo.



Desegnaĵo farita laŭ memoro de Martinus, kiam li 28-jara loĝis en Kopenhago

Tie li havis bonan panoramon, li povis vidi la trajnon, kiu veturis inter Hjørring kaj Frederikshavn, kaj reve li povis iri al foraj lokoj. La knabo sentis, ke ion plian devis ekzisti ekster lia malgranda mondo.

Kiam li estis 12-jara li fariĝis paŝtisto ĉe la granda bieno *Ulstedbo*, kiu situis proksime de lia hejmo. Estis grandaj kampoj, kiuj poste dividiĝis en terpecoj por konstruado de vilaĝoj.

Post la lerneja edukado kaj la konfirmacio Martinus havis kelkajn mallongajn laborojn dum malmultaj jaroj en la proksimeco, ekz. en la bieno de la vilaĝestro.



Martinus 11-jara en 1901

Kiam Martinus estis 17-jara li transloĝiĝis al aliaj partoj de kontinenta Jutlando kaj al insulo Fueno, kie li dum pluraj jaroj laboris en diversaj laktejoj kiel laktisto.

Kiam li estis 30-jara, li havis profundan spiritan sperton, kiu komplete ŝanĝis lian vivon kaj kaŭzis, ke li kapablis verki tiun spiritan sciencan aŭ kosmologion, kiu faris lian nomon konata tra la mondo.

Kiam la edukpatrino fariĝis vidvino en 1920 ŝi vendis *Moskildvad*, kaj transloĝiĝis al ŝia edukfilino.

En la sekvaj jaroj la domo havis plurajn posedantojn. Sed en 1954 amiko de Martinus, la eldonisto Sam Zinglersen (1912-2007), aĉetis la domon. En 1990 okaze de la 100-jariĝo de Martinus tiu s-ro Zinglersen renovigis la domon por konservi ĝin por la estonteco. Al arkitekto Boe Seest (1916-1983) Martinus iam detale klarigis, kiel lia infana hejmo aspektis interne kaj ekstere, kaj do en 1990 laŭ arkitekta desegnaĵo la domo transformiĝis al la origina stato de la infana hejmo.

Tiamaniere la domo nun staras kiel atestanto por la estonteco montrante la kondiĉojn, sub kiuj Martinus trapasis sian infanecon.



La patrino Else Christine Mikkelsen (1848-1901) mortis nur 53-jara



Memora kverko plantita de Martinus en 1972.
Foto Helen Claesson



Logiko kaj La ideala nutraĵo en la rumana lingvo

de Mihai Trifoi, Rumanio

S-ro Mihai Trifoi, antaŭ kelkaj jaroj tradukis la kvar simbollibrojn (La Eterna Mondbildo 1-4) el Esperanto en la rumanan lingvon, kaj antaŭ nelonge li tradukis du pliajn librojn

Kial traduki „Logiko”? – Ĉar laŭ Martinus: „*Ĝia tasko estas, kiel suplemento de mia ĉefverko „Livets Bog”, montri la veron de la rilato inter la homo kaj vera logiko*”. La malkaŝo de tiu vero fariĝis centprocenta pruvo pri tio, ke la teraj homoj ankoraŭ estas malproksime de manifestado de logiko en ilia reciproka kunvivado, en iliaj organizado kaj administrado de la mondvaloraĵoj, ĉar per tiu malkaŝo montriĝis fakto, ke tiuj kunvivado, organizado kaj administrado identas kun – infero, kio signifas kulmino de malharmonio kaj la el ĝi sekvanta doloro kaj sufero aŭ la promesita „ploro kaj grincado de dentoj”. (Logiko, la 82-a ĉapitro).

Ankoraŭfoje evidentiĝis, ke Martinus pravis pri la bezono de nova ekonomia ordo en la mondo. Ĉu ne ĝuste dum niaj tagoj ni vidas ke multaj landoj, eĉ la plej ekonomie fortaj, trapasas gravan mondan ekonomian krizon?! – Multaj entreprenoj fiaskas, multegaj homoj suferas kaj la landaj registaroj estas devigataj urĝe fari kontraŭkrizajn planojn por revigli la falantajn ekonomiojn. – Tio demonstras, ke vere la nunaj „*organizado kaj administrado de la mondvaloraĵoj*” maltaŭgas kaj estas necesa nova monda ekonomia ordo. Eble ke tio ne okazos tuj en nia tempo, sed estonte la krizoj alvenos en sinsekvaj ondoj, ĝis kiam la „monda registaro”

decidos la necesan ŝanĝon. Memkompreneble, tio okazos nur laŭ evoluo de la homa mentaleco, sed Martinus tre vere montris tion en siaj verkoj.

* * *

Kial traduki “La ideala nutraĵo”? – Ĉar, laŭ Martinus: “*Al la grandaj problemoj nuntempe rapide evoluantaj apartenas la demando pri la ideala nutraĵo*.” (1-a ĉapitro). – “*Miajn analizojn mi donas pro tio, ke la nutrodemando estas tiom grava por la homaro; neniu akiros plenan sanon aŭ vere sendoloran ekziston, antaŭ ol li havos ĝustan rilaton al la nutrofonto, kiu, laŭ la eternaj leĝoj, destiniĝis por la evoluŝtupo de progresinta homo, al la nutrofonto, kies funkcio ne postulas kruelaĵon kaj mortigon; kaj pri la ekzisto de tiu nutrofonto mi atentigos en ĉi tiu libreto*.” (4-a ĉapitro). Jen do, pro tio mi konsideris, ke ankaŭ la rumanaj legantoj rajtas havi la eblecojn studi la valorajn verkojn de Martinus. Mi decidis traduki ilin ĝuste pro ilia logikeco kaj pro la fakto, ke mi mem konvinkiĝis pri tio; se por mi ili estis inspiraj, tio povus esti valida ankaŭ por aliaj miaj samlandanoj interesataj pri la grandaj demandoj de la vivo.

* * *



Mihai Trifoi en tiu nordmara pejsaĝo,
kiun Martinus ankaŭ tre amis

kiuj volas studi “Livets Bog” (La Libro de la Vivo). La prelegoj, la debatoj, la diskutrondoj aŭ la simpla babilado kun la novaj geamikoj kreas veran studetoson, kiu influas pozitive nian vivon kaj donas al ni novajn inspirojn, novan energion, novan vivemon. Do venu al Klint por aŭskulti bonajn oratorojn, por koni la veran amikecon, por studi kune kaj evolui spirite!

Originale verkita en Esperanto de Mihai Trifoi, Bixad, Rumanio.
mihaitrifoi@yahoo.com

Pasintjare mi havis denove la eblecon partopreni la kurson pri la kosmologio, en Klint. Sed antaŭ tio, kune kun Einar Hjorth, mi vizitis por la dua fojo la naskiĝdomon de Martinus en Sindal; por kompreni la verkon, oni devas koni ankaŭ pri la vivo de ĝia aŭtoro, ĉar tio povas esti helpo en la kompreno de la ideoj de la koncerna verkisto.

Gravas ne nur koni la verkojn kaj iom pri la vivo de la aŭtoro, sed ankaŭ havi rektan kontakton kun la studentoj kaj la “praktikantoj” de la kosmologio de Martinus. El tiu vidpunkto, la partopreno en la kosmologiaj kursoj en Klint estas tre rekomendindaj al ĉiu,



Librovendejo Editura Mix, Str. Fdt. Harnulului 20/B/12, RO-2200 Brasov, Rumanio.
www.edituramix.ro, contact@edituramix.ro.
Vidu la Martinus-libron en la fenestro.



Strando ĉe Klintebjerg, majo 2009

La vibradoj de la ideala nutraĵo

de Martinus


Klarigo de la simbolo kiel prezentita de Martinus en la libro "La ideala nutraĵo"

La rondo en supra maldekstra angulo simbolas la homon kiel "vivunuon". La ŝtupoj dekstre ilustras parton el la evolua ŝtuparo de ĉiuj vivaj estaĵoj. La unua (de malsupre) signas la stadion, kie troviĝas la rabobestoj. La dua estas la ŝtupo, kiun la tera homo atingis. Sur la tria "la vera homoregno" havas lokon.

Dekstre en la unua ŝtupo vidiĝas rondo – *la vianda rondo* – simbolanta tiajn vivunuojn, kiuj konsistigas animalan manĝaĵon – la manĝaĵon de rabobestoj. La rondo en dua ŝtupo – *la vegetara rondo* – simbolas la vivunuojn de kerno-, radiko- kaj foliproduktoj, la

ĝustaj ĉefaj nutroelementoj de la tera homo. La tria rondo – *la fruktokarna rondo* – signas la vivunuojn de fruktokarno, la plej "alta" nutraĵo, tiu kiu estas destinita por homoj sur la unua ŝtupo de "la vera homoregno".

La malhela ringo de la vianda rondo signas la "A-vivunuojn", kiuj ja ne taŭgas kiel nutraĵo en la organismo kaj tial rezistas kontraŭ la digesta procezo kaj fine mortas. Ilia vibrado – montrita per la zigzaga linio – montriĝas ĉe tiu rezisto tro forta por la homa organismo, kies vibradon montras la supra zigzaga linio en la dua ŝtupo.



© Martinus Institut 1981

La vibradoj de la ideala nutraĵo

Rigardante ĉi tie la vegetalan rondon, oni konstatas, ke ĝia malhela ringo estas malpli ampleksa ol tiu de la vianda rondo; tio signifas, ke ĝi enhavas multe malpli da “A-vivunuoj” ol da “B-vivunuoj”; sekve konsumo de la koncernaj produktoj – la vegetalaj – estigas samgrade malpli da mortigo kaj tial pli harmonias kun la leĝoj por evoluinta kaj progresa homo. Al ĉi tio ankaŭ respondas, ke la vibrado de vegetalajoj – montrita rekte antaŭ la vegetala rondo – multe malpli diferencas de la homa vibrado ol kiom animalaj vibrado.



En la tria ŝtupo ni konstatas, ke la fruktokarna rondo havas neniun malhelan parton, kio ilustras, ke ĉi tie ne ekzistas “A-vivunuoj”. En la ŝelo de frukto tamen troviĝas kelkaj “B-vivunuoj” ne digesteblaj en organismo, sed ili forlasas vivaj kaj nedifektitaj la digestan kanalon. Ĉiuj ceteraj vivunuoj estas sorbataj vivaj de la organismo kaj daŭrigas tie sian naturan evoluon. Ili do faras neniun reziston, kiun la homa organismo devus venki.

Pro la kutimo manĝi animalaĵojn kaj malfacile digesteblajn vegetalajn produktojn la homa organismo trejniĝis al digesta fortostreĉo pli granda ol neceso por fruktokarna nutrado; tio kaŭzis, ke la homorganisma vibrado estas iom tro forta kompare kun tiu de fruktokarno, kiel vidate en dua kaj tria ŝtupoj; fruktokarno do ankoraŭ ne povas esti la ĉefa nutraĵo por homoj. Ĉi tion ilustras la bildo per tio, ke la zigzaga linio ĉi tie

estas malpli granda ol tiu de la homa vibrado.

De la simbolo pri la homo kiel “vivunuoj”, supre maldekstre, kondukas tri punktaj linioj al la tri unuaj ŝtupoj; tio ilustras, ke koncerne sian nutradon la homo troviĝas sur ĉiuj tri evoluŝtupoj, t.e. ke li prenas sian nutraĵon el animalaĵoj, el kerno-, radiko- kaj foli-produktoj, kaj el pura fruktokarno. La provizore ideala nutraĵo por la homo estas la pli mildaj formoj el la kerno-, radiko- kaj foli-produktoj. Tamen estas rekomendinde, pli kaj pli kutimigi sin al fruktokarno, kiu

ja estos la sola, la ideala nutraĵo por la plenevoluinta homo en la unuaj zonoj de la vera homoregno. Kaj tiam, en la vera homoregno, la ekskluziva uzo de fruktokarno plidelikatigos la homon kaj preparos lin por pli altaj ŝtupoj de la evoluo, kie li ekhavas sian tutan nutraĵon senpere el *la aero*. Ĉe tia *aer-nutrado* la pulmoj do estos transprenintaj la tutan procedon de asimilado en la organismo. La homo estos lasinta post si la krudajn formojn de ekzisto. Ne plu lia organismo sin nutros helpe de mortigo kaj de kadavroputrado, ne plu ĝi estos ujo por fiodora feĉo kaj aliaj kloakaĵoj. Sed la korpa organismo, delikata kaj subluma kiel neniam antaŭe, kaj la altevouinta spirito atestos pri tio, ke ĉiuj primitivaj kaj krudaj formoj de homa ekzisto, kun ĉiuj korpaj kaj spiritaĵoj, estas definitive venkitaj de la potenca kreoforto de la amo.

Citaĵo el “La ideala nutraĵo”, Traduko C. Graversen, 1965.



La Kosmologio de Martinus kaj nutraĵo

de Bjørn K. Øyen, Norvegio

Laŭ Martinus ni homoj estas survoje el *la besta regno* kaj en *la perfektan homregnon*. La nuntempaj homoj aŭ *la terhomoj* nune travivas multajn krizojn, kaj grandaj partoj de niaj sistemoj, politikaj kaj religiaj dogmoj tre multe ŝajnas *diseriĝi*. Sed Martinus tamen rigardas nian estontecon tre pozitive; li diras, ke nia globa krizo estas rezulto de nia estinta vivmaniero en “la batalo por la ekzistado”, “ies pano – ties morto”, “la rajto de la plej forta”, tio ke ni devas mortigi aŭ venki niajn kunvivantojn por postvivi. Tiaj ĉi principoj estas perfektaj vivoreguloj en certa nivelo de la evoluo – tio estas en la besta regno, kie regas la principo: *forto* donas *rajton*. Tio ĉi estas natura kaj bezona parto de nia evoluo – ĝi evoluigis nian talenton pri intelekto, samtempe ke ĝi spertigis nin pri suferado kaj evoluigis nian humanan talenton.

En la estonta perfekta homoregno la moralo estos tute alia ol la moralo en la besta regno – kie *rajto* donas *forton*, kaj kie *doni* vivon, *ami sian proksimumon* estos la plej alta feliĉo. Tiu ĉi principo plej altgrade influos ankaŭ nian rilaton al la bestoj. Iom post iom, pro nia kreskanta talento por simpatio, ni ne plu povos partopreni la sabotadon de “rajto de la vivo” de aliaj vivantaj estaĵoj. Tamen ni ankoraŭ ne povas eviti vivi laŭ “mortiga principo”, ĉar ni manĝas legomojn, kiuj ankaŭ enhavas

vivantajn estaĵojn. Sed el du malbonoj pli malgrandan elekto.

Laŭ Martinus la planta estaĵo ankoraŭ ne evoluigis iun konscion en la fizika estadonivelo. Ĝi nur povas “subsenti” lumon kaj mallumon – kaj kiam ĝi estas disŝirita. El tiu ĉi fakto ni komprenas ke mortigo de plantoj reprezentas konsiderinde malplian suferon ol mortigo de bestoj.

La nunvivaj homoj ne plu estas provizitaj per digestorganoj, kiuj estas konvenaj por digesti (krudan) animalan nutraĵon – malgraŭ ke kelkaj homoj digestas tian manĝaĵon pli bone ol aliaj. Tia speco da nutraĵo vere estas celita al la rabobestoj, ĉar ili havas taŭgajn organojn por digesti animalan nutraĵon.

La terhomoj ĝuste estas evoluontaj pli malkrudan formon de digestado, kiu iom post iom forlasos la principon de la mortigado, por ke ni ankaŭ rilate al la mikroestaĵoj povos plenumi la leĝon pri “amo al proksimumo”. Sed ni ankoraŭ apartenas al la nivelo inter “besto” kaj “homo”, kaj pro tio nia digesta organo ne estas finevoluinta por vivi tute “senmortige”, kio montriĝos en la estonta tuta “fruktopulpa nutraĵo” en la perfekta homoregno.

Martinus opinias ke post ĉirkaŭ 3000 jaroj la tera loĝantaro havos kosman konscion. Tiutempe la kulturo estos bazita sur talento por perfekta amo al proksimumo – bazita sur ekvilibro

inter la *inteligento*- kaj la *sentoenergio*, sed en multe pli alta nivelo ol tiu, kiun ni konas. Tiu ĉi ekvilibro samtempe evoluigos la *intuicienergion*. En siaj libroj Martinus havas iom alian definon de intuicio, ol tiun kiun ni konas.

Iam en la estonteco nia animala nutraĵo rezultigos diversajn malsanojn, kontraŭnaturan morton aŭ *karmon de akcidento* sekve de la *leĝo de movado* – tio estas kiel rezulto de agoj laŭ la *principo de mortigo*. (Vidu ekz. *La Eterna Mondbildo 1*, simbolon 15 kaj *La Eterna Mondbildo 3*, simbolon 33). Sed tio ĉi ne devas esti interpretita kiel iu formo de puno de “kolera dieco” sed kiel “pedagogia principo”, per kiu ni lernas la “leĝojn de la estado” aŭ la “leĝon de la karmo”. Multaj el la nuntempaj krizoj povas esti rigarditaj kiel ankaŭ rezulto de nia disvolvo de “la principo de la mortigo”. Martinus priskribas nin kiel “vunditajn rifuĝintojn inter du regnoj”, kie ni travivas la unuajn “naskokonvulsiojn” de la nova venonta kulturepoko – pleniĝonta per ĉioscio, kreopovo kaj amo al ĉio kaj ĉiuj.

Koncerne nutraĵon, la homoj – kontraste al la bestoj – ne bezonas vivi de kadavroj kaj, laŭnature, ankaŭ ne bezonas bredi dombestojn por buĉado kaj por atingi profiton, kio ankaŭ multobligas la suferadon sur la tero. Laŭ la kosmaj analizoj, rigardi la homon kiel la kulminan punkton en la evoluo – estantan rajtigita al traktado de siaj “pli junaj” proksimuloj en la evoluo laŭ bontrovo – estas miskompreno. La vivoj

de la bestoj estas tiom valoraj kiom niaj vivoj.

Laŭ Martinus la sangaj manĝokutimoj de la homaro kaŭzas la plejmultan de niaj malsanoj, se ni tiel daŭrigos ni devas konstrui ĉiam pli grandajn hospitalojn. *Animala manĝaĵo* estas, laŭ Martinus, la plej granda kaŭzo de kancero, sed ankaŭ korvejnaj malsanoj, sed tio ĉi estas nur la pinto de la glacimonto. Koncerne la karnon de mortintaj muskolaj fibroj, la procezo de la putrado ekkomencas tuj kiam la besto estas buĉita, pro tio ke la purigaj funkcioj estas haltigitaj, kaj la skorioj restos. En la karno troviĝas ankaŭ restaĵoj de suplementa nutraĵo, kiun la bruto ricevas (penicilinon kaj tetraciklinojn), kaj tio ĉi naskas grupojn de bakterioj rezistajn kontraŭ tiuj ĉi preparaĵoj.

La scienco antaŭ longa tempo konstatis ke nia modesta bezono de proteinoj sen la plej eta problemo estas kovrebla el la plantoregno. Sekve troviĝas neniu nutraĵa argumento, kiu povus defendi ke ni manĝas viandajn produktojn. Ekzemple la simpla kombino de la proteinoj kun kruda rizo kaj pizoj, faboj aŭ lentoj estas tute bona.

En libro n-ro 5 – *La ideala Nutraĵo* pli amplekse estas priskribita, kiel animala kaj vegetala nutraĵo influas niajn psikan kaj fizikan sanstaton.

Originale verkita en Esperanto de Bjørn Øyen, Oslo, Norvegio.
bjorn-oyen@c2i.net





Libroj de Martinus en la litova lingvo

de Rita Valčiukaitė, Litovio

En fino de 2009 la Martinus-Instituto eldonis la libron “La ideala nutraĵo” en la litova lingvo. Espereble baldaŭ oni povos legi ankaŭ la libron “La mistero de la preĝo”, ĉar la traduko jam estas preparata por la eldono. Ĉi-momente mi tradukas la libreton “Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio”.

Komence mi dubis, ĉu mi okupiĝu pri tradukado, ĉu estos sufiĉe da legantoj. Tamen nun mi tre ĝuas tiun ĉi laboron, ĉar unue mi mem spertas grandan plezuron tradukante la librojn de Martinus, mi povas pli profunde studi ilin ol nur legante. Due mi povas doni librojn al la homoj, kiuj nur kapablas aŭ preferas legi ilin litovlingve. Mi rimarkis, ke lastatempe pli kaj pli da homoj interesiĝas pri funkciado de la vivo en la universo.

Antaŭ nelonge mi renkontis virinon, kiun mi konis antaŭ multaj jaroj, kaj surprize por mi ŝi ekparolis pri aferoj, kiuj, mi vere ne kredis, ke povas interesi ŝin. Kiam mi komencis rakonti al ŝi pri la kosmologio de Martinus, montri kaj klarigi la simbolojn, ŝi tiel avide „glutis“ la novan scion kaj petis ĉe mi librojn, por ke ŝi mem povu legi kaj doni ilin al siaj amikinoj.

Do tio konvinkis min, ke valoras traduki ankaŭ al la malgrandaj lingvoj, ĉar ĉiam aperas iuj homoj, kiuj deziras legi la librojn de Martinus.

Originale verkita en Esperanto de Rita Valčiukaitė.

ritavalc@takas.lt





Martinus 4

La malluma kaj la luma mondsavo

de Erik Gerner Larsson

En 1939 Erik Gerner Larsson multe skribas pri la enhavo de Livets Bog 1, kiu eldoniĝis en 1932. (LB2-LB7 eldoniĝis en la jaroj 1941-1960). La suba artikolo rilatas al 2-a ĉapitro en LB1.

Retroen ĵetante la rigardon al la limoj de la homa esplorado ni konstatas la ekziston de la religia principo. Ke ĉi tiu principo en siaj unuaj stadioj ne aperas en speciale nuancitaj formoj, estas absolute komprenebla. Sed de tiu momento, kiam la vivanta estaĵo sin levas el la besta regno kaj per ĝermanta reflektkapablo komencas formi al si la unuan nebulan bildon de la estado, tiam estas konstatata, ke ĉiam ekzistis “Io”, kion oni en formo de dieco aŭ dioj adoris kiel originon de tiu vivo, kiun oni vivas. Ĉi tiu diadorado, kiu en sia plej profunda naturo senvualigas la sopiron de la individuo al agnosko de la vero, devis en sia unua ĝerma komenciĝo eksakte respondi al tiu materialo de spertoj, kiun oni posedis, kaj ni ja ankaŭ vidas, ke tiu percepto de la Dio, kiun la surtera homo unue formis al si, estis percepto, kiu prezentis Dion kiel enhavantan de ĉiu potenco. En sia primitiva estado kiel ĉasisto aŭ militisto la homo devis prezenti al si la originon de la ekzistado kiel estaĵon, kiu posedas ĉion, kio al ĝi mem mankas. Kaj oni ankaŭ vidas, ke la unua kulto de Dio, kiun oni konstatas, estas sanga festo, per kiu oni penadis gajni la simpation de ĉi tiu supereca potenculo kaj la supozeble pro tio sekvantan bonvolon kaj helpon en malfacilaj situacioj. Ĉar la batalo por la

vivo senĉese senvualigis, ke nur la fortulo venkas, tiam ni ankaŭ vidas, ke la unua imago pri la percepto “ĉielo” indikas lokon, al kiu enirrajton havas nur la fortulo kaj la venkulo, – la dihejmo “Valhalo” ne estis loko por malfortuloj!

Sed iom post iom, kiam la rezultato de la ĉiutaga estadmaniero montriĝis kiel sufero kaj denove sufero, tiam pli kaj pli aperas la percepto pri kompatato. La primitivaj religioj degeneris kaj malrapide cedis al la tri mondreligioj, kiuj hodiaŭ ŝajne regas la mondon. Sed la efikoj de la religia kulto, kiu ekzistis en jam delonge malaperintaj tempoj, ankoraŭ ne ĉesis. Sub la formo de “C-scio” t. e. kutimkonscio ili hodiaŭ estas bazo de granda parto de imago pri la percepto “moralo” de la surtere nun ekzistanta homo. “La morto per la glavo sur la kampo de la honoro” ne havas radikon en la kristanismo, sed kontraŭe en multe pli aĝaj religiaj idealoj.

Ĉar estas fakto, ke la religia vivo de la surtere vivanta homo estas prezentata de grandaj spiritaĵoj gvidantoj, al kiuj oni donis la nomon “mondsavantoj” tiam ankaŭ fariĝos fakto, ke ĉi tiu gvidado principe povas esti dividata en du absolute malsamaj metodoj. Ĉi tiuj metodoj estas plej korekte esprimataj en la leĝo de Moseo: “Okulo pro okulo, dento pro dento” kaj de Kristo: “Metu vian

glavon en ĝian ingon, ĉar ĉiu, kiu mortigas per glavo, devas pereigi per glavo!”

Ĉar la unua progresigas la malamon, la koleron kaj la venĝon, tiam Martinus nomas ĝin “la malluma mondsavo” kontraŭe al “la luma mondsavo”, kiu per sia stimulado de la amo al la proksimulo kaj humaneco nun staras antaŭ signifa evoluo.

Ĉar la malluma mondsavo estas la profunda kaŭzo de ĉio, kion ni konas sub la nomo de “milito», tiam fariĝos fakto, ke “la mallumo” ankoraŭ superregas la homan mentalecon. Sed ĉar ĉia mallumo estas identa je tiu kontrasto,

sen kiu la agosko de “la lumo” estus neebla, tiam tiu katastrofo, kiun la homaro de la tero nun estas travivonta, estas en sia plej profunda analizo nur esprimo de amo. Estas tiu “horo de la rikolto”, kiu devas antaŭiri “la maturiĝantan grenon”; ĉi tiu “greno” estas la absoluta postulo de la kristanismo pri amo al la proksimulo, koncentrita en la ordono “amu unu la alian” – kaj en tiu instruo estos – kiam la mallumo estos elfurioziĝinta – ĉiuj gentoj sur la tero benataj.

Tradukis Margrethe Noll en 1939.

TEVA – internacia esperanto-asocio por vegetaranoj

de Ejnar Hjorth



Jam de la komenco de la esperantomovado partoprenis en ĝi multaj vegetaranoj, ankaŭ grafo Leo Tolstoj, kiu donis fortan moralan subtenon al Esperanto. Li estis fervora vegetarano laŭ etikaj principoj, kaj per speciala skriba konfirmo Leo Tolstoj akceptis esti honora prezidanto de la nova fondita Esperantista Vegetarana Asocio. Tial TEVA, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, estas ne nur unu el la plej aĝaj ankoraŭ ekzistantaj Esperanto-asocioj, sed ankaŭ la plej aĝa ankoraŭ funkcia internacia vegetarana asocio en la mondo. Ĝi fondiĝis la 16-an de aŭgusto 1908.

La asocio celas “disvastigi Esperanton inter vegetaranoj kaj vegetarismon inter esperantistoj”, en “amika kaj aktiva kunlaborado, cele al respekto de la

naturu kaj de ĉiuj vivantaj estaĵoj”. Ĝia slogano estas “Vivu kaj lasu vivi”. Ĝi iĝas dum la lastaj jaroj ĉiam pli aktiva. Ambaŭ ideoj, tiu de vegetarismo, kaj tiu de Esperanto, celas pliboniĝon de la mondo, ĉu al la vivo de bestoj, ĉu al la lingvaj rajtoj de homoj. La membroj de TEVA loĝas dise tra la mondo. Tiel eblas, tra Esperanto, kontakti samideanojn-vegetaranojn en aliaj landoj aŭ kontinentoj.

En Danio estas multaj membroj de TEVA, pro la kosmologio de Martinus. Li montris al ni la valoron de vegetarismo kaj esperanto. Pli ol 30 ricevis la revuon *Esperantista Vegetarano*. Se vi volas membriĝi en TEVA skribu al teva@ivu.org. ejnarhjorth@mac.com

Claude Piron

Antaŭ du jaroj, la 22-an de januaro, forpasis Claude Piron, populara verkisto, pedagogo, preleganto, sed ankaŭ aŭtoro de Esperantaj poemoj kaj kantoj. (Kosmos n-ro 2-2008).

Lian albumon *Frandu Piron* oni povas aŭskulti ĉe: www.ipernity.com/doc/69959/album/94772, kaj albumojn *Tra l'mondo* kaj *Karnevaletto* kun

kanzonoj, kiujn li verkis aŭ adaptis por Olivier Tzaut, ĉe www.youtube.com/profile?user=otzaut#grid/uploads, kaj <http://sites.google.com/site/oliviertzaut/>.



Atilio Orellana Rojas en Danio

Atilio Orellana Rojas, kiu plurfoje vizitis *Martinus Center* en Klint, kaj kiu dum la somero 2009 vigle, instige kaj inspire instruis tie kaj en Kopenhago, estas nun kontaktebla pere de la jena retadreso atilioorellanarojas@gmail.com. Denaske argentina Atilio estas komitatano de UEA kaj okupiĝas pri instruado de Esperanto kaj pri trejnado de instruistoj jam dum pli ol jardeko. /Ole Therkelsen

95-a UK en Havano, Kubo, 17-24an de julio 2010

Dum la 95-a UK en Havano, Kubo, Martinus-Instituto



laŭplane partoprenos en la "Movada Foiro", kaj krome per stando aŭ budo kun informado pri la kosmologio. Verŝajne Jonas Dalmoŝe prezentos la kosmologion de Martinus.



Atilio Rojas, Mihai Trifoi, Ejnar Hjorth en Klint somero 2009

INFORMO PRI

LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo *Kosmos* estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: *La Tria Testamento*.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri *La Tria Testamento* okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

La frontpaĝa bildo: © Graça Victoria, dreamstime.com. Bildo paĝo 17: © Nikolay Petkov, dreamtime.com

Eldonanto: Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 38 34 62 80

fakso (+45) 38 34 61 80

Telefontempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

UEA-kodo mins-d

www.martinus.dk

info@martinus.dk

www.shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),

Helen Claesson kaj Jonas Dalmoŝe.

Kompostado: Dan Elhaŭge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj

Prezo en EU: DKK 70,00 aŭ EUR 9,40

Prezo ekster EU: DKK 56, EUR 7,50 aŭ USD 9,60

Unuopaj kajeroj: DKK 35,00

Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut

Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

ISSN 1600 4116.

La infana hejmo de Martinus en Sindal



La naskiĝdomo de Martinus "Moskilvad" bele situas en valo ekster la limo de vilaĝo Sindal en la norda parto de Jutlando ĉe la adreso: Ulstedbovej 15, DK-9970 Sindal.

La hodiaŭa muzeo same aspektas kiel en la jaro 1890, kiam Martinus naskiĝis. En la muzeo oni ankaŭ povas vidi filmon pri la vivo de Martinus kaj aĉeti liajn librojn.

La domo estas malfermita laŭ interkonsento. Vidu www.martinussindal.dk.



Korajn Salutojn

Xuan kaj Flemming Nielsen
Ulstedbovej 15,
DK-9970 Sindal
Danlando